Estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo
ĵaŭdon la 26-an de aprilo 2018 per Skype

Partoprenis:

Mario Machlik en Tromsø
Ulf Lunde en Os
Jardar E Abrahamsen en Trondheim
Anne Karin Bondhus en Bryne

0. Tagordo

Aprobita.

1. La protokolo de la interkonsiliĝo la 15-an de marto

Aprobita.

2. Ekonomio

Skagen vekst 60 789 kr.
Skagen Høyrente 132 709 kr.

3. Jarraporto, jarkalkulo 2017

Tiuj ne pretos antaŭ la somero. La sekretario kontaktu la oficejon kaj klopodu pretigi la partojn kiujn ne bezonas la estrato pridiskuti, antaŭ la venonta interkonsiliĝo.

4. Skandinava kongreso 10a -13a de majo 2018. Deklaro de la skandinavaj Esperanto-asocioj prezentota dum la jubilea programo.

Aliĝis 8 norvegoj kaj 35 alilandanoj antaŭ la limdato la 30^{an} de marto.

5. Komitatano A de UEA

Herman Ranes estas demandita, sed (almenaŭ ĝis nun) ne jesis.

Se li ne baldaŭ respondos, ni ofertos la postenon al Kjell Peder Hoff, kiel antaŭe proponite -- se ni entute volas havi komitatanon.

6. Nova leĝo pri sekurigo de personaj datumoj

NEL devas povi pruvi ke ni konformas al GDPR kiam temas pri traktado de informoj pri membroj kaj konsento de membroj pri abonoj, arĥivado de membroinformoj, ktp.

Frivillighet Norge havas bonajn konsilojn tiurilate en la jena paĝaro: http://www.frivillighetnorge.no/no/faq/personvern/
La estraro strebu al plenumado de tiuj konsiloj.

7. Eventualaĵoj

Nenio.

La interkonsiliĝo daŭris de 20.00 h ĝis 21.05 h.

La venonta interkonsiliĝo: la 24^{an} de majo je 20.00 h.

Raportis Ulf Lunde.